# Eta influo de la granda tertremo

Yamagishi Etsuko

En la 11-a de marto nesupozeble granda tertremo atakis regionojn de To:hoku! La televido sinsekve sendadas bildojn de la cunamoj, la postotertremoj, la ruinoj de urboj kaj vilaĝoj, kaj la akcidentoj de nukleaj centraloj. Ĉiuj estis vere seriozaj. Ili influetis ankaŭ min.

S-ino Segawa kaj mi planis vojaĝon al Tokio por spekti italan operon, kiu okazos en la 17-a de marto. En la 10-a kun granda espero ni kontrolis la preparaĵojn reciproke: ĉu vi estas preta por vojaĝi al Tokio?

En la sekva tago terurega tertremo okazis! Ni telefone parolis kaj decidis, ke ni tuj malmendu la vojaĝon, konsiderante malĝojon de la suferantoj kaj la antaŭvideblan danĝeron de postskuoj. Mi vizitis turisman oficejon, kie oni speciale akceptis la malmendon postulante neniom da kompenso. Ni tuj decidis kontribui iom por helpi damaĝitojn per monofero. Po tridek mil jenoj ni oferis. Tio estis, tamen, $\frac{1}{2}$ de la vojaĝkosto.

Baldaŭ la organizantoj de la opero anoncis neokazon de la ludado. La bileto kostis dudek kvin mil jenojn, kion oni repagos al rezervintoj. Do ni planas, ke ni denove faru pli da subteno! Ni devos subteni la suferantojn longdaŭre! Ĉu jes?

*Strecĉita kordo! Ĝojo kaj lamento*
*Vibrigis vin. Sed ili al la brust'*
*Delonge fremdas kaj indiferento*
*Jam kovras ilin per dikpolva krust'.*

— kantas Kalocsay. Malmola krusto kovranta mian koron fendiĝis de la malĝojo de la suferantoj. Sabata kunsido en la 23-a de aprilo neokazos. Ĉi-jare SES-anoj nombras 21.